

Registered at G.P.O, Melbourne, for transmission by post as newspaper.



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 116 (Ninth Year) Melburno (Melbourne), Australio. 10 Februaro 1930.

THE FUTURE OF "LA SUDA KRUCO"

URGENT CALL FOR HELP.

Owing to the critical financial position in which the Redakcio finds itself, and the obvious necessity for keeping before the Esperantists of Australia and New Zealand a monthly vehicle of information as to their activities, it has become necessary to consider seriously our course of action for the immediate future.

Despite careful economy 1929 closed with a deficit of some fourteen pounds. This fact has, to the editor's mind, rendered it imperative to take one of two paths. The first is, that friends of "La Suda Kruco" guarantee yearly a sum of money as a permanent fund to be devoted to its continued production. Judging from the experience of 1929 the sum needed for the present year is twenty pounds. A promise of £6/10/- has already been given, and by 20 March next it is believed that the money will be guaranteed. Every movement of the Redakcio will be governed by the will to economise and use faithfully the resources entrusted.

The second alternative is to issue a reduced "S.K." as supplement to the excellent English propaganda magazine "International Language." Such a supplement would contain a full chronicle of club activity and news of purely local character. "International Language" contains striking propaganda articles in English, current "points in the advance" of Esperanto throughout the world, and pages for learners, which would more than offset the elimination of such matter from "S.K." The success of this venture, the only practicable one if the appeal for £20 fails, would depend directly on all present "S.K." subscribers, groups and clubs according to their unhesitating support. It would be an experiment only, the success or failure of which would rest in the hands of the readers. That our only link, "La Suda Kruco," either in its present form or that of a chronicle sheet, should pass through failure of adequate response, would be a deadening blow to the movement here.

Say, by the support of your steady subscription, "It shall not be!"

LA REDAKCIO.

FIRST NEW ZEALAND CONGRESS.

A Triumph for Esperanto.

An important page in the history of Esperanto in New Zealand was written at Wellington on the 17-18 January when the first New Zealand Esperanto Congress was held. In every way the gathering of Dominion Esperantists was a success, and although the congress was of short duration, much valuable work was accomplished. Everyone who took part will long cherish memories of the pleasant hours

spent at Maoriland's initial congress, for the two days, from the congress-members' viewpoint, were really a visit to Esperantujo with Esperanto being used on all sides. A wonderful spirit of friendship pervaded the congress, at the conclusion of which many regretful farewells were taken, and during the proceedings everyone appeared to recognise that the congress itself, above all, was undertaking the important duty of placing Esperanto firmly and strikingly before the New Zealand public and Government, and those in

authority, and was demonstrating in no uncertain manner that the ideal for which many New Zealanders, apart from other peoples, have for long worked and suffered had at last advanced to such strength as to arrange a national meeting of Esperantists. Such was the duty and such was the result. The newspaper mention in Wellington alone measured eight feet—which included excellent reports of the meetings, especially of the public lectures—and reports were telegraphed through the Press Association to every newspaper in the Dominion.

Attended by members and representatives of the clubs at Auckland, Christchurch, Wellington, Masterton, and Hamilton, U.E.A. delegates of Auckland, Wellington and Fielding, and by Esperantists from various parts of the Dominion, including several pioneers with 20 to 25 years' (and more) association with the language, the congress was held under the auspices of the New Zealand Esperanto Association, founded last year. About 50 persons took part, but a good number of Esperantists throughout New Zealand joined as absent members, and many others forwarded letters and telegrams of greeting. Many fine donations were made to the congress funds.

Mr. C. J. Adcock, president of the N.Z.E.A. formally opened the congress in Esperanto at 2 p.m. on January 17th, and after delegates, pioneers, and visitors had been welcomed a N.Z.E.A. business session at which the Press was present was commenced, Mr. Adcock delivering his presidential address. The annual report, presented by the secretary (Mr. W. King) and the financial statement tabled by the treasurer (Mr. E. Jack), were adopted, both documents being a testimonial of solid progress. The Press published much of the information contained in the report.

Club delegates then outlined the work of their clubs and the position of Esperanto in their towns. The speakers were as follows: Mr. Adcock (Hamilton), Mr. More (Christchurch), Mr. Jack (Wellington), Mr. Dewar (Masterton) and Mr. Russell (Auckland). The election of officers of the N.Z.E.A. followed, the existing Executive-President, Mr. C. Adcock (Drury); Vice-presidents, Mrs. E. Watkin (Auckland), Mr. L. E. Dust (Wellington), Mr. J. Russell (Auckland), and Mr. N. Bell, M.A. (Christchurch); Hon. Treasurer, Mr. E. Jack (Wellington); Masterton Club Delegate, Mr. A. Dewar; and Hon. Secretary, Mr. W. King (Wellington)—were unanimously

re-elected en bloc, and a hearty vote of thanks for their services during the past year was carried. Other business included adoption of new rules, exploration of questions relative to incorporation, and the inauguration of an examination committee. The meeting decided to hold the Second Congress at Auckland during Easter, 1931.

In the evening propaganda meeting was held, which proved very successful. In the absence of the Mayor, the Deputy Mayor, Councillor M. Luckie, presided. In addition to the two splendid speakers who addressed the audience—Mr. C. Adcock and Mr. F. Combs, M.A. (headmaster of Wellington school)—Mr. Luckie himself delivered an address from the chair which greatly enhanced the effectiveness of the meeting, particularly in view of the fact that the Press reported the speakers' remarks. A resolution was unanimously passed, amid applause, directing the attention of the Government to the advantages of Esperanto, and asking for the language to be taught officially in the schools of New Zealand.

The second day was devoted to the entertainment of congress members, who, after being photographed, began a sight-seeing tour of Wellington and the adjoining bays. The congress program was brought to a close with a social evening, at which Mr. W. Edmanson was loudly applauded for his Esperanto recitation, "How Rubenstein played the piano," and Mr. Adcock for ably demonstrating the famous "Ĉe" method of teaching Esperanto. On behalf of Mrs. A. Chapman-Taylor, of New Plymouth, who attended the congress with great enthusiasm despite her 84 years, Mr. W. King handed to the secretary of the Wellington Esperanto Club (Mr. Bertram Potts) for propaganda purposes, a large and valuable collection of world post-cards, including a personally autographed card of Dr. Zamenhof and photographs of the Doctor in various meetings. Mrs. Chapman-Taylor thoroughly merited the thanks which Mr. Potts tendered her when replying, for the collection represented ten years' work—a work commenced about 25 years ago.

With a fitting speech Mr. Adcock formally closed the First Congress, all rising to sing "La Espero" and the National Anthem. An informal meeting of the U.E.A. delegates who attended the congress was held the following afternoon, Mr. L. Dust (Wellington) presiding. Conducted in Esperanto, the business consisted mainly of con-

*sidering means of extending the U.E.A. membership and delegate system in New Zealand, and of assisting to blot out the unfortunate deficit of the world congress held at Vienna in 1924.

ORIGINALA VERKARO De Zamenhof VALOREGA KOMPILO

Tre bedaŭre nia gazeteto ne disponas pri inda lokspaco por ĝusta takso kaj taŭge fraziĉa laŭdo, kion nepre meritas ĉi tiu bela monumento al genia homo. La kompilinto, d-ro J. Dietterle, kaj la fidela firmo Ferd. Hirt kaj Filo ricevu plenan konfirmon de sia agado per senhezita aĉetvolvo de la Esp-ista mondo. Ses partoj formas la verkon. 1. Antaŭparoloj. 2. Gazet-artikoloj. 3. Traktaĵoj. 4. Paroladoj. 5. Leteroj. 6. Originalaj Poemoj. Sub tiuj rubrikoj estas kolektita preskaŭ ĉio nun havebla al la kompilinto, ekster "tio, kio rilatas la Esperanto-lingvon nur koncerne gramatikon kaj vortaron." Piednotoj klarigas aŭ atengigas pri strangaj formoj kaj arkajkaĵoj. "Oni devas ĉiam rememori, ke la stilo de Zamenhof komence ne estis tiel perfekta, kiel en la postaj periodoj, kaj ke li komence uzis vortformojn, parolturnojn ktp., kiujn li ne plu uzis poste." Jen frutekstaj formoj jam mortintaj el la uzado: "malgraŭ l' intenco; progresigi l' aferon; ju (sen "pli"); uzado ĝin (de ĝi); la plej parte artikoloj; aludo (kvanteto) de vino; beletristo (la homo); rimarku ankaŭ "viando (karno), sofismo, voĉi, centri (transitiva verbo), propagatoro, reportera (raportisteca), plano (en senco de "nivelo," A. plane) proceso (procedo), tia-ĉi, partizano, signoj de poŝto (postmarkoj?), modifikacio, renegato." En la cetere preskaŭ senmakula teksto aperas du-trifoje supozebla preseraro "(ne)orportuna."

Lia modesteco brilas el sekvantaj: "Por igi la kritikistojn tute apartigi la aferon de la aŭtoro, mi publike diramem. ke mi ne estas multge instruita lingvisto, ke mi estas tute senmerita kaj ne konata en la mondo. Mi scias, ke mia konfeso malvarmigos multajn por la afero, sed mi volas, ke oni juĝu ne l' aŭtoron, sed la verkon." Tion skribis modela tradukinto el sep lingvoj!

Zamenhof estis samtempe sincere anime naiva kaj mondafere sagaca. La unua montriĝas ĉe lia projekto kolekti nomojn de dek milionoj de homoj promesantaj lerni Esp-on, kaj lia kredo ke la mondo skribos "Gete," "Bajron" anstataŭ "Goethe," "Byron."

La dua en lia konsilo al iu, ke tiu forĵeti la vortojn "direktoro de bjuro demanduma tutmonda," "ĉar tia tro laŭta titolo metus malbonan lumon sur vin kaj ankaŭ sur nian aferon." La leteroj pri la Hachette kontrakto montras sur Zam., kiel homon just-sente defendanta la rajton sian. Lia amspiro al unueco-konkordo kaj forta suspekto al reformemo estas sciateblaj el la aserto, "Pro la unueco kaj senkonfuza ordo, kiuj estas por nia afero tiel gravaj, la libroj instruaj devas esti pedante konservativaj eĉ en la plej malgranda bagatelo!" Ankaŭ el la iom stranga frazo, "la eksperimentojn reformatorajn mi ĉiam tenis por danĝeraj por nia afero." Pludire, "Vi scias, kiel longe mi batalis kontraŭ reformado...sed bedaŭrinde la afero ne dependas de mi!"

Ni ridetas pro la neĝuste elektita metaforo: "El gutoj fariĝas maro; sed se ĉiu konservos sian guton en sia poŝo...."; "utileco palpebla." Ni admiras la facile trafajn esprimojn: faktoj prenitaj el la aero" (groundless assertions); "nudavortaj (outspoken) malamikoj"; "la demando komencis ricevi tute alian vidon"; "nin ĵetos" (luktarta termino figure uzata); "longa - parole"; "sinteni - povanta," "sensubtena," "sesa regna potenco" (the sixth estate).

De O.V. la leganto ricevas pensbilon de modesta, aminda geniulo, de homo honesta en ĉiu trakto, de entuziasmo kiu tamen volis ke lia invento traktu propran vojon per propra merito, de persista laboranto, kiu kun premitaj dentoj neniam lasis al si la koraferon rezigni pro deprimio. Tra la tuta libro iluminas lia animo, devige elvokanta profundan respekton eĉ de tiuj, kiuj ne persone lin konis. Tiu amo, kiun sentis ĉiu koro kontaktiĝinta kun la lia, estis la daŭra fonto el kiu ŝprucadis la flama fervoro kaj neŝancela fido de tiuj alte privilegiitaj homoj, kiuj kun li laboris.

Al ĉiu povanta elspezi 15 ŝilingojn libroaĉete, ni tre konsilas ke tiu konservu la verkon kiel ĉiamkonsulteban amikon.

600 Pg. Pere de BEA.—(ROBO).

POINTS IN THE ADVANCE.

Since the last issue we have learned—That the people's paper in Iceland, "Althjúbladid" almost every day prints an Esperanto chronicle.

That in Canton has been founded an Esperanto library with a capital of 6,000 dol.

That in the girls' school and technical school in Kiheku (Japan)

English has been displaced by Esperanto.

That 145,000 French francs has been collected for "La Maison de l'Esperanto" (Esperanto House) in Paris, an institute for the propagation of our language.

That in Persia, where a third of the intelligentzia are Bahaists, Esperanto is striding ahead.

That at Kameoka and Ajabe (Japan), Oomoto townlets, the populations speak Esperanto!

That the Kommissar of Posts in U.S.S.R. has authorised two more Esperanto stamps.

That in Nijni-Novgorod (U.S.S.R.) 570 people, in 27 classes, have begun to learn Esperanto.

That Primo de Rivera, the Spanish dictator, visited an Esp. exposition and spoke very favorably of the language.

UNUA NOV-ZELANDA ESP. KONGRESO.

Tre sukcesa afero.

WELLINGTON, 19an de jan-o. Grava pago en la historio de E-to en N.Z. verkiĝis ĉi-tie la 17-18an de jan-o, kiam la unua E-ta Kongreso sukcese okazis. Nia lingvo frape estis elmetata antaŭ la okuloj de la registaro, divers-fakaj aŭtoritatuloj kaj la publiko. La gazetarulo donis libere spacon (ok futojn entute) al la kunvenoj, precipe al la publikaj paroladoj, kaj raportoj telegrafe flugadis per la Pres-Asocio al ĉiu ĵurnalo en la Dominio.

Ĉeestis la kongreson membroj kaj reprezentantoj de la kluboj ĉe Auckland, Christchurch, Wellington, Masterton kaj Hamilton, delegitoj UEA el Wellington, Auckland kaj Feilding, kaj E-tistoj el diversaj partoj de N.Z., inter kiuj troviĝis pioniroj de 20-25-jara laborado por E-to. La lastjare fondita N.Z.E.A. ĉion aranĝis. Ĉirkaŭ 50 homoj partoprenis, kun la simpatio de sufiĉe granda nombro de forestaj aliĝintoj. Donacoj tre helpaj eniris la kason.

S-ro C. Adcock, prez. de NZEA, malfermis kongreson la 17an de jan. Jarraporto kaj bilanco akceptiĝis kiel atesto de solida progreso.

Vespere propaganda kunveno, tre sukcesa. Urbokonsilisto Luckie prezidis. S-roj Adcock kaj F. Combs, M.A. (ĉefinstruisto ĉe lernejo en Wellington) donis brilajn alparolojn, kiujn la Preso raportis. Ĉiĉvoĉe oni rezlucis, ke oni altiru atenton de la registaro al la utiloj de E-to, kaj petu permeson oficiale lerni ĝin en la N.Z.-a instruoj.

La duan tagon ĉiuj amuziĝis. S-ino A. Chapman-Taylor, kiu alestis kongreson malgraŭ sia 84-jara aĝo, sindone donacis valoran kolekton de tutmondaj p. kartoj, inkluzive unu aŭto-grafita de Zamenhof kaj kelkaj nepozaj fotoj de la doktoro. Antaŭ 25 jaroj ŝi ekis arigi ilin, kaj dum 10 jaroj ame laboris super tiun plezuran taskon.

Postkongresa kunveno de UEA, tute en E-to. Oni konsideris, kiel pligrandigi UEA-membraron kaj delegitaron en N.Z., kaj helpi forigi la deficiton de la viena kongreso de 1924.

La Dua Kongreso havos lokon en Aucklando Paskon 1931.

KURSO PER TRADUKADO.

(kondukata de s-ro George Gordon, F.B.E.A.; sekretariino: f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, E.10., Melbourne.)

TRADUKO 5.

INSULA ĜARDENO EDENA.

(daŭrigata)

La tempo pasas tre agrable por la loĝantoj en tiu izola loko, kaj sciigoj pri la zorgoj kaj turmentoj de la ekstera mondo nur obtuze penetras en ĝin kvazaŭ tra vualo. Pro la eterna somero, reganta (2) ĉion, la vivado en tiu malproksima klimato estas tre agrable kaj forte efikas por enestigi en homon (8) tiun misteran, nedifineblan "ion," nomatan la allogo (3) de la tropikoj. (Fino)

MALMULTE KONATA INDUS-TRIO.

(el "The Press," Christchurch, Nov-Zelando).

Nur malmultaj homoj povas akiri aŭtentikan informon pri industrio propra sole al la suda parto de Nov-Zelando kaj al Tasmanio, kaj kiu donas okupon al tre pli ol tricient Maorioj dum du-tri monatoj ĉiujare. La industrio estas kaptado de "mutton-birds" (t.e. "ŝafajbirdo." Puffinus brevicaudus. 4). Kiam en Februaro de la jaro mil-okcent-sesdek-kvara la Maoriaj posedantoj (5) cedis al la Nov-Zelanda registaro Stewart Island (stjuart ajland) kune kun ĉiuj apudaj insuloj grandaj kaj malgrandaj, kelkaj el la insuloj samtempe estis rezervitaj, sub la protektado de la registaro, por la kaptado de "mutton-birds" de la Maoriaj vendintoj (5) kaj iliaj heredontoj (5). Ĉiu insulo havas propran historion. Okazas multa (12) eksciteco kiam oni disoutas pretendatan rajton de iuj indiĝenoj al birdkaptado, ĉar la Maorioj gajnas multe da mono dum siaj ĉiujaraj vizitoj en

AN IMPORTANT DUTY

In order that the Editor may obtain a true reflection of the will of all those who receive "La Suda Kruco," he asks urgently that, by March 20th, (N.Z. members till 30th March) he may have before him a representative array of slips, on each of which is written the assertion favored.

- (1) I am willing to support "La Suda Kruco" by regular payment of the usual subscription.
- (2) I am willing to guarantee yearly the sum of £...s....d. to a fund for its permanent publication.
- (3) I am wishful of "La Suda Kruco" appearing henceforth as chronicle supplement to "International Language."

la insuloj. La koncernataj (2) homoj argumentas pri antikvaj intertribaj malpacoj, pri ĉefoj kaj parencoj de tempo datumanta jam ĝis tricient jaroj antaŭe. En fruaj jaroj okazis multaj kvereloj (6), kiam Maorioj ne havantaj (2) heredan rajton de prapatroj insistis birdkapti sur la insuloj, sed en la jaro mil-naŭcent-deka speciala tribunalo, sidanta (2) en Invercargill (inverkargil), faris juĝon pri tio, kiuj estas rajthavantoj (5). Poste en la jaro mil-naŭcent-dudek-dua tribunalo sidis por difini la interesojn de tiuj, kiujn ne kontentigis la juĝo, farita (2) en la jaro mil-naŭcent-deka. Tiu tribunalo aljuĝis rajton al ĉiuj, kiuj povis apogi sian pretendon per kaj (7) heredeco kaj multjara kaptado. La industrio floris jam longe antaŭ la enveno de Eŭropanoj en Nov-Zelandon (8). Tiam la sudinsulaj Maorioj interŝanĝadis (9) la kaptitajn birdojn kontraŭ produktoj de nordinsulaj Maorioj kaj en malpli fruaj jaroj kontraŭ varoj (13) de la multaj balenkaj fokokaptaj ŝipoj, kiuj en tiu tempo vizitadis (9) Bluff kaj Stewart Island. Nuntempe la Maorioj ricevas po (10) ok ĝis dek pecoj por birdoj, tial la plej spertaj kaj aktivaj homoj inter ili povas perlabori po (10) ĝis kvin funtoj sterlingaj en tago dum la birdkaptada sezono.

La supra diritaĵo klarigas, ke nur certaj Maorioj kaj iliaj (11) edzinoj kaj infanoj estas permesataj viziti la la insuletojn.—(daŭrigota).

NOTARO.

1. Skriberaro.—En Suda Kruco, p^o 110. L34. Anstataŭ "inĉoj" legu "coloj." 2. Adjektiva participo. Notaro 1/6.—3. "allogo" (ne "allogon," ĉar ĉi tie la substantivo estas predikata). Cox 109.—4. Notaro 4/8.—5. Substantiva participo. Notaro 1/9.—6. "kvereli," to quarrel. Vorto aprobita de la Lingva Komitato.—7. "both... and," kaj...kaj. aŭ "ne nur sed ankaŭ."—8. Akuzativo post "en," into. Cox 67 (2). Mill.—9. Sufikso -ad ĉi tie estas primas kutimon. Cox 270 (1). Mill.—10. Notu, ke "po" ne signifas "per"

sed "at the rate of." Cox 259 (22 aŭ 23). Mill.—11. "iliaj" (ne "siaj") edzinoj, ĉar tio estas parto de la subjekto de la frazo. Cox 135.—12. aŭ "multe da." — 13. "varoj," wares, goods, commodities. Vorto aprobita de L.K.—14. Ĵus eldoniĝis bonega lernolibro "Step by step in Esperanto" de C. M. Butler, tre lerta verkisto. La prezo en Londono estas 2ŝ. 6p. Ofte en ĉi tiuj notoj mi faros referencojn al ĝi, uzante la mallongaĵon "But."

KRONIKO.

Perth, O.A.—La ĉi tiea societo bone progresas. Laŭ jarraporto prezentita de energia sekretariino s-ino Sainsbury la anaro jam kreskis ĝis sesdek. Tri grupoj funkcias, kaj lernantoj faras kontentigan antaŭen-iron. F-ino Barclay kaj s-ro Wallace bonvole donacis librojn kaj gazetojn E-tajn por pliriĉigi la bibliotekon. S-roj Saar kaj Casey, f-ino Byatt kaj s-ino Easter instruas diversajn grupojn.

Antaŭ ne longe vizitis nin s-ro O'Donohue, antaŭe estimata prezidanto de Sidneja Esp-a Societo. Oni elkore lin bonvenigis. Vizitantoj ĉiam estas bonvenaj.

Post libertempo denove funkcias la "Westralian Esperanto Society." Meznombro da geanoj ĉeestis. Tri grupoj studadas:— 1. Elementary; 2. Intermediate; 3. Advanced. Ĉiu el la studantoj montras vigan inteligentan intereson pri la celo; pro tio la instruistaro kuraĝigas. Je la nua kaj tri-dek minutoj lecionoj ĉesas kaj la geanoj ĝuas muzikon, kantadon kaj amikan interparolon, ĝis la deka. 1. kaj 2. grupoj uzas la lernolibron de Helen Fryer, 3. grupo uzas "Cox's Commentary." Ĉiam la instruistaro kuraĝigas studentojn paroli esperante.

S-ro Saar faris paroladon, esperante, pri "la vivado ĉe Eucla." Li laboris tie tri jarojn tial la faradoj kaj okazoj inter la kelkaj geologantoj ĉe plej soleca telegraf-stacio apud la suda marbordo treege interesis la aŭskultantaron. La venontan kunvenon S-ro Caine parolos esperante pri la "Vivo de Zamenhof."

Melbourne, Vic.—En decembro kelke da anoj de la Melb. Esp. Societo sidis por la ekzamenoj.

La traduka rondo, je la dua mardo, daŭras kaj progresas, kaj s-ro Hudson ree gvidas ĝin post sia reveno.

Dum la pasintaj du monatoj, s-ro Hudson regalis la anojn per rakontoj pri sia restado en Hindujo. En la paroladoj li sekvis la vojiradon de sia vojaĝo kaj jam priparolis Bombay; Poona en la montoj; Mt. Abu, kiu estas notinda pro bela templo; kaj Udaipur, vera indiĝena ŝtato. Ĉe Amber oni konservas multekostajn tapiŝojn, kaj manuskriptojn en sanskrita lingvo, kiuj valoras tre grandan sumon. Oni starigis en Amber pli bele grandiozan monumenton pro la sankta elefanto ol pro la reĝino. Agra estas la urbo, kie troviĝas la Taj Mahal, tiu mirinda kaj grandioza konstruaĵo el blanka marmoro kun belege farita mozaiko, interne kaj ekstere. Neforgesebla spektaklo.

FOUND BY ESPERANTO!

Through an Australian.

When, one Sunday in last Spring, I was about to post a letter to my Australian correspondent, Rojo Worral, of Abbotsford, N.S.W., I chanced to meet my neighbor, A. Löffler. Hearing the word "Australia" his face fell, and he told me of his brother's migration to that country in 1913 and of his sudden cessation in 1919 in writing home. He, together with his family, was very anxious to learn of the missing lad, but neither the consulates nor the police headquarters in the various cities could give any information on the matter. Moved by his story I seized the opportunity of mentioning Esperanto as a possible means of regaining touch with the lost migrant. Months passed, months of difficult searching, but at last, thanks to the untiring persistence of my Australian friend, the missing one was finally traced, for on 18th October I was able to hand to Löffler a communication from his brother, by this time given up as dead.

To my Australian friend, Rojo Worral, who sacrificed many a free hour in this search, I render sincere thanks. My German friend, too, thanks him, not only for the recovery of his long-sought brother, but also for the fact that now he is an enthusiastic Esperantist.

(Trans. of letter by Willy Falke, member of Esp-grupo Neumark, Germ. to "Heroldo de Esperanto").

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitancas al la jenaj fidejuloj. J. Parker, 4/6, nov., '30; f-ino M. Bush, 1/-; C. Wittenbach, 4/6, dec., '30; P. Paris, 5/-, dec., '30; F. Williams, 4/6 dec., '30; P. Holmes, 4/6, jan., '31; anonco de tiu sama, feb., '31, 30/-; Melb. Esp. Soc., donaco, 6/6; f-ino M. Helm, 4/6, junio, '30; W. Horne, 4/6, jan., '31; S. Clarke, 4/6, jan., '31 and 2/6 donaco; F. Thomas, 4/6, feb., '31; A. Saar, donaco 20/-; H. Hutton, 9/-, julio, '31; F. Bury (donaco) 5/-; W. Edmanson, 10/-, okt., '31; s-ro Johns, 5/-, dec., '30; s-ino McNab, 5/-, dec., '30.

APPRECIATION BY "HEROLDO"

Says the "Heroldo de Esp-o": En la kvina kontinento Aŭstralio aperas **La Suda Kruc**. Kvankam ĝi estas gazeteto, kiel la redakcio mem nomas ĝin, vi certe konsentas kun mia opinio, ke en la suda duonglobo ni nepre bezonas ankaŭ Esperanto-organon, kaj ni ĝojus, se kreskus inter niaj antipodoj tiel la movado mem kiel ankaŭ la necesa gazetaro. „La Suda Kruc“ donas en sia oktobra numero unue daŭrigon de la historio de Esperanto, kaj en artikolo „Vojoj al mondlingvo“ estas fiksitaj kvar punktoj, kiuj povas konduki al tiu celo: 1. la kunfandiĝo de ĉiuj lingvoj; 2. la laŭgrada kultura kaj ekonomia hegemonio de unu lingvo super la aliaj; 3. akcepto de iu nacia lingvo por tia rolo, kaj 4. adopto per la potencoj de neŭtrala kreita helplingvo.

SUBTENU LA SAMIDEANAJN METIISTOJN!

PERCY HOLMES
Elektristo Kaj Radiisto.

Lumiloj, gladiloj, purigiloj, motoroj, ventumiloj sperte instalitaj kaj riparitaj. Se via radia aparato ne bone funkcias, tuj sciigu al P. Holmes, 212 Noone str., Clifton Hill.

Memoru—Por ĉio elektra.

Telefonu: JW 4017.

KION FARAS ICK?

Respondo de s-ro Merchant.

Sur pĝ 116 sub "Budapest kaj la ĵurnalaro" ni plendis al I.C.K. pri la ignoro de Aŭstralio de la kabloservoj eŭropaj, en tio ke nenio venas al ni kable pri la universalaj Esp. kongresoj. Al nia plendo s-ro J. Merchant rekomenditletere bildigas por ni la aferstaton. Skribas li:

"Unu el la plej fruaj laboroj kiujn mi mem entreprenis post mia elekto al la prezidanteco de ICK, estis peni plibonigi la aranĝojn ĉe niaj universalaj kongresoj por transsendo de novaĵoj al la div. landoj. En Budapeŝto s-ro Kreuz mem prenis sur sin la devon plifaciligi la laboradojn de la vizitantoj kiuj deziras fari raportojn ktp. Mi kredas ke ankoraŭ neniam plendo estiĝas pri tiaj aranĝoj.

"Due, ni en ICK faris ĉion laŭpove por interesigi la presposedantojn en nia afero sed kvankam la lokaj ĵurnaloj multe helpis nin per bonegaj ĉiutagaj raportoj, la Presagentejoj ne opiniis ke nia afero estas sufiĉe grava por transsendi raportojn eksterlanden. Tial, raportoj devis esti transsenditaj je nia propra kosto. Ni havas treege malgrandan sumon da mono je nia dispono kaj tute ne posedas la rimedon sendi telegrame raportojn al la diversaj landoj. Mi mem pagis el mia propra poŝto por la sendado de kelkaj raportoj al la ĵurnaloj en mia loka urbo kaj ili estis presitaj, sed oni ne povas atenti la saman agon parte de ĉiuj kongresanoj. Multaj el niaj anoj volonte farus la laboradon senpaga por vin helpi per raportoj sed ili ne povas pagi la koston de la transsendado telegrafe.

"Se vi skribos al BEA por ricevi tujajn raportojn telegrafe pri la U.K. en Oxford, BEA volonte aranĝos tion por vi kondiĉe ke via societo aŭ ĵurnalo pagus por la sendado. Se vi nur deziras ricevi raportojn pere de la ordinara poŝto, kompreneble BEA mem pagus la koston.

"Kredu min, ke nia ŝajna malatento pri via asocio kaj lando ne estas nia kulpo. Estas ĉiam la manko de la monrimedoj. Post tralego de la rapor-

to pri la laborado de ICK dum la pasintaj dekdu monatoj, vi certe miros pri la grandaj laboradoj entreprenitaj je tiel malgranda kosto. Eĉ mi, kiu scias ĉion pri la afero, preskaŭ ne povas kompreni kiamaniere nia Ĝenerala Sekretario sukcesas fari tion multe kiam li nur havas je sia dispono kelkajn milojn da frankoj.

"Eble vi iom plibone komprenos la pozicion kiam mi diras ke dum la pasinta jaro mi ricevis de s-ro Kreuz pli ol 2000 kopiojn de leteroj kiujn li, kun la helpo de nur unu helpantino, skribis al diversaj samideanoj pri mil kaj unu diversaj aferoj.

"Estas nia sincera deziro fari helpojn al ĉiuj demandantoj sed kiam la plenumo de la demandoj kostas monon ni bedaŭrinde devas deteni nin, ĉar ni nepre devas limigi niajn servadojn al nia kaso.

Sincere la via.

J. MERCHANT,

Prez de ICK kaj de BEA.

LA LIBRO PRI KIU PAROLAS LA MONDO.

La libro, kiu priskribas la militon, en plena realeco, sen plibeligo, kaj kiu pro tio estas plej bona propagandilo por la paco.

La plej aktuala libro de l'nuntempo en Esperanto.

La eldonejo de Heroldo estas aperigonta, okaze de la nunjara Librotago (je la 15-a de decembro), la faman verkon de Erich Remarque: „En Okcidento nenio Nova“ (All Quiet on the Western Front) en la Esperanta prilaboro de kvar spertaj samideanoj: ĉefred. Jung, red. Berger, Prof. D-ro Ellinger kaj instr. Hoffmann.

La verko de Remarque estas, kiel oni scias, la plej aktuala libro de la nuntempo—la libro, pri kiu parolas la mondo. En germanujo ĝi atingis dum mallonga tempo eldonnombrom de 3 milionoj da ekzempleroj, krom tio ĝi estas jam tradukita en dudeko da aliaj naciaj lingvoj.

Kio estas la sekreto por tiu tute unika sukceso de la libro de Remarque? Ĉar ĝi priskribis la militon tia, kia ĝi estis, en plena realeco, sen

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

plibeligaj aŭ idealigaj aldonoj. Al la centmiloj kaj centmiloj da frontsoldatoj germanaj, francaj, anglaj kaj alilandaj ĝi refreŝigis la memoron pri la teruraĵoj travivitaj persone de ili, kaj entute en ĉiuj legantoj, kiuj ne estas en la katenoj de l' nacia ŝovinismo, ĝi elvokas flaman protestsenton kontraŭ tia abomeninda hombuĉado, kia estas la milito. Multo troviĝas en la libro de Remarque, kion ni esperantistoj povas plene akcepti kaj substreki. Pro tiu ĉi tendenco oni jam konsideris proponi ĝin por la Nobel-premio de Paco.

Estas kompreneble, ke tiatendenca libro trovis ankaŭ multajn kontraŭulojn en la naciista tendaro, sed tio kaŭzis nur plifamigon kaj ankoraŭ pli grandan disvastigon de la jam sen tio mondfama kaj tutmonde disvastigita libro.

La eldonejo de Heroldo devis fari grandajn streĉojn financajn kaj alispecajn por ebligi la eldonadon de tia aktuala kaj mondfama libro en Esperanto. Ni esperas ke la esperantistaro rekompencos nian kuraĝon per multnombra aĉeto de la libro okaze de la nunjara Librotago. Certe tiuj, kiuj ankoraŭ ne legis la romanon de Remarque en sia nacia lingvo, volonte ekkonos la verkon en la Esperanta traduko; sed ankaŭ tiuj, kiuj jam posedas nacilingvan eldonon, havos grandan profiton, komparante la Esperantan tradukon kun la nacilingva eldono kaj konstatante per tio la bonegan taŭgecon de la internacia lingvo eĉ por la traduko de tiel malfacile tradukebla verko, enhavanta multajn esprimojn ĝis nun tute nekutimajn en la literaturo de iu ajn popolo.

La libro estos presita sur bona blanka papero kaj enhavos laŭeble la portreton de la aŭtoro kaj malgrandan biografion. La prezo estos por la broŝurita eldono rmk. 5.— kaj por la bindita eldono rmk. 7.—.

The following paragraph recently appeared in the "New Zealand Methodist Times," the editor of which, the Rev. Percy Paris, is a keen Esperantist:—"Internacia Metodista Ligo Esperantista, has been formed by Esperantists of the Methodist Church in Germany. Its purposes are (1) to spread the Esperanto language among the Methodists of the world; (2) to work together with other Christian Societies for mission work in Esperanto; (3) to translate or create and distribute Christian literature in Es-

peranto. All Methodist Esperantists are requested to join and help. Please address—Cyrill Jotow, 180 Ginnheimer Landstrasse (Prediger - Seminar), Frankfurt a.M., Germany."

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duanlundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikadojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.